★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Eduard Ingriš (1905 – 1991) – aŭtoro de trampa kanto Niagaro

Eduard Ingriš devenis el bohemia vilaĝo Zlonice apud Slaný, kie li naskiĝis la 11-an de februaro 1905. Li provis studi en Naturscienca Fakultato de la Karola Universitato en Prago, sed baldaŭ li preferis studadon de muziko en konservatorio. Li fariĝis sukcesa muzikisto kaj komponisto, aŭtoro de multe da ĉeĥaj operetoj kaj instruisto de muziko. En sia trampa kabano li komponis faman kanton "Niagaro". Ĝis nun oni uzas lian trivoluman lernolibron de gitara ludo. Dum nazia okupado germana gestapo lin malliberigis. En la jaro 1947 li foriris en Argentinon, kie li volis okupiĝi pri muziko. Brazila radio lin informis pri komunisma puĉo en Ĉeĥoslovakio, tial li decidis ne plu reveni. Li ne povis kontinui sian vojaĝon en Argentinion, sed post naŭ monatoj li atingis Peruon kaj en Limo fariĝis sukcesa fotisto, filmkameraisto kaj instruisto de muziko. Li konatiĝis kun Thor Heyerdahl kaj ripetis lian eksperimenton flosi sur balsa floso el Suda Ameriko en Polinezion. La unua eksperimento kun balsa floso Kantuta (1955 – 1956) preskaŭ finis tragike, sed la dua eksperimento kun la floso Kantuta la 2-a (1959) estis sukcesa. Ekspedicio atingis insulojn Raroia kaj Matahiva kaj tiel ĝi pruvis, ke originaj loĝantoj de Suda Ameriko kapablis Polinezion prisetli. Fotoj kaj filmoj de Ingriš estas signifaj dokumentoj. Eduard Ingriš forpasis la 12-an de januaro 1991 en Reno (Usono, Nevado).
Ĉeesta programo, ĝi estos registrata
**Prelegos:** Oldřich Arnošt Fischer

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 31-an de januaro 2024 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- Nova libro de Oldřich Arnošt Fischer: **El Mirinda Mondo de Kaktoj (*Cactaceae*)**. En la libro oni trovos kolorajn fotojn de 160 kaktaj specioj kaj koncizajn datumojn pri iliaj naturaj trovlokoj, adaptado al malfavoraj vivkondiĉoj. signifo, historio de kakta kultivado kaj personecoj, kiuj okupiĝas(is) pri la kaktoj. Kaktista vortareto kun kelkaj esperantigitaj sciencaj nomoj estas aldonita. Por Brnanoj nur **239** Kč! Vi povas mendi ĉe mi aŭ ĉe la aŭtoro, la librojn post mendom mi prenos al nia renkontiĝo.
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis la jarfino.

★

## Programo en februaro

La 7-an *Ankoraŭ ne konfirmita, eble Esperanto kaj policistoj*, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice
La 14-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova 65a, Brno

La 21-an **Vortprovizo por ĉiĉeronado**, rete per Skajpo
La 28-an **Jarkunveno de membroj**, Klubejo Hybešova 65a, Brno

Mi petas vin, ke vi jam pripensu, kiel vi povas kontribui al la programo venontjare, precipe jam en januaro. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Ne forgesu, ke nia programo povas esti nur tia, kiun mi ĝin preparos.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:
- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra turo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)